

Kiel ĉefkomisiito pri Aktivula Trejnado, mi estis invitita ĉeesti kaj kunlabori kun la estraro dum parto de la estrarkunsido en Prago, la unua en 2019. Estis vere agrabla - sed laciga - sperto kunlabori kun ili. El la estraro ĉeestis Konstanze, Léon, Tomáš kaj Francesco. Aliaj ĉeestantoj estis mi, kiel komisiito pri Aktivula Trejnado, Querino, kiel komisiito pri Landa Agado, Unika, ĵuselektita komitatano Ĉ, kaj - enrete dum unu parto de kunsido - Karina el Brazilo kiel komisiito pri Edukado. Clément rolis kiel ĉeesta protokolanta volontulo. Sara Spanò ĉeestis parto de la estrarkunsido kiel observanto de UEA.

La unuan tagon la planoj por la **IJK en Slovakio** estis prezentitaj pli detale. Mi ĝojas pri la planoj kaj pri la tuta organiza teamo. La LKK havis kunsidon ĵus antaŭ la estrarkunsido, do ni ricevis vere freŝajn informojn kaj novajn fotojn de la ejo. Ni komencis prilabori la planon por la komitatkunsido kaj la elektoj por la nova estraro. Mi kontribuis pere de tio ke mi pensas ke gravas ke sinprezentoj kaj sesio pri kandidatoj okazu dum unu tago, kaj elektoj okazu ne dum sama sed dum la posta tago, por doni malpli streĉan sperton al ĉiuj. Ni diskutis kion ni bezonas okazigi kiel trejnadojn kaj diskutgrupojn dum la IJK.

Querino, komisiito pri **Landa Agado**, prezentis la ĝisnunajn rezultojn de **KODEJO**. (Se vi ankoraŭ ne partoprenis, kontaktu Querinon ĉe querino.neto@tejo.org !). Estis interese aŭdi pri la bezonoj de malsamaj organizoj de la tuta mondo, kaj ankaŭ de Unika ni ricevis impreson de Koreio kaj pli azian vidpunkton pri kelkaj temoj. Mi ege ĝojas pri tio ke KODEJO estis finfarita. Malkiel lastjare, kiam mi ne povis liveri ĝustajn informojn pri niaj Landaj Sekcioj por la Jarlibro, tiuj datumoj ĉi jare disponeblas. Ne estas planoj por presi la jarlibron ĉi-jare, sed almenaŭ estos ĝisdatigitaj informoj haveblaj.

Ni diskutis la eblajn planojn por organizi **IJK-n en Ĉinio** eble en unu el la venontaj jaroj, kaj kiel eblas certigi ke ĝi estos tutazia kaj tutmonda kongreso, kaj ne nur ĉina + eŭropa evento. Mi persone sentas min iomete streĉita, ĉar ankoraŭ estas nur svagaj planoj pri tio en 2021. Se ĝi okazos post 2021 mi malpli streĉiĝus, sed tiukaze mi baldaŭ ŝatus vidi aliajn kandidatiĝojn, por ke ili povu komenci plani iri al Nederlando venontjare. Por la IJK en Afriko estis almenaŭ tri jaroj da antaŭlaboro, kaj por IJK en Ĉinio mi vidas similajn defiojn pri vizoj, organizado, antaŭpreparado kaj komunikado. Kaj tio estas malgraŭ tiuj tri jaroj, ĝi ne estis tiom sukcesa ĉiumaniere. (Kelkmaniere jes, ĉar mi vere ĝuis la eventon!)

Ekzemple ni diskutis ke estus bone ligi IJK-n en Azio kun instruado de Esperanto antaŭ kaj dum la evento en la lando, por vere eluzi la eblon plifortigi la lokan movadon. Ni povas proponi sendi instruistojn de niaj instruistaj projektoj (por ankaŭ doni al la lernantoj aliron al internacia etoso, kiu povas esti entuziasmiga sperto), sed Unika substrekis ke tiel la instruistoj bezonas enkondukon pri kiel instrui Esperanton al parolantoj de ne-hindoeŭropaj lingvoj. En diskuto kun Karina Oliveira, komisiito pri **Edukado**, ni diskutis svagajn planojn okazigi sesiojn pri tio dum IJK 2020 en Nederlando. Mi iomete esploris monfontojn por ekz. subteni german-nederlandan kunlaboron kaj plusendis al GEJ kaj organizantoj de IJK.

Mi aŭskultis la planojn pri **Pasporta Servo** kaj ke estos preparita demandaro pri kion la PS-gastigantoj kaj gastoj volas kaj bezonas. Tio gvidos la direkton de la projekto. Mi ĝojas ke Baptiste estas la komisiito pri PS kaj liaj planoj montras, ke li estas la taŭga persono por tio.

La ĉeestaj estraranoj bone kunlaboras kaj mi opinias, ke ili ĉiuj estos bonaj kandidatoj por la venonta estraro, se ili volas kandidatiĝi.

Ni (plu)planis unu projekton, la venonta **trejnista** projekto, pri kio ni subvencipetos en aprilo. Mi esperas, ke tio povas helpi plifortigi niajn landajn sekciojn en Eŭropo. Pri trejnadoj, ni diskutis la enretan KER-trejnadon kaj kiuj el la KER-anoj respondecas pri ĝisdatigado de ĝi. (Ĝi estas eble la plej bona ret-trejnado, kiun ni havas, sed tio ne signifas, ke ni simple lasu ĝin kiel ĝi estas se oni povas plibonigi ĝin.).

Burokrataĵoj estis pritraktitaj, inter alie pri aĉeto de biletoj por partoprenantoj de Partoprenu IJK-n kaj la fintraktado de la AEJK-projekto.

Mi demandis pri la venontaj planoj por finfine havi bonan datumprotektan politikon, kaj Francesco raportis ke li espereble fintraktos la temon antaŭ la fino de la estrara tempo. Mi vere ĝojas se ni finfine povas okupiĝi pri varbado de membroj anstataŭ atendi datumprotektan politikon. Merkatikaj planoj ankaŭ estis pridiskutitaj, kaj ke la ĉefa tuja okupiĝo estas trovi komisiiton.

La estraranoj kunsidas aldone nur inter si, sen la aliaj. Tiam mi pli-pritraktis la finan raporton pri la FEJ-projekto, kiun mi pridiskutis kun Konstanze. Ŝi petis min ĝisdatigi kelkajn partojn de la Jarraporto 2018, pri aferoj en kiuj mi estis enplektita aŭ pri kiuj mi estis respondeca kaj ankoraŭ ne finverkis. La lastan nokton ni sidis kaj prilaboris tiujn partojn. Mi verkis unuan malneton de miaj partoj de la jarraporto antaŭ la fino de mia mandato, kaj tiam ankaŭ petis la aliajn, ke ili jam ekverku. Pro tio ke ili plejparte estis en la nova estraro, mi tiam ne puŝis la verkadon.

Vespere ni renkontiĝis kun lokaj aktivuloj kaj ni ĉiuj dormis en la apartamento de Léon kaj Tomaŝ, kie ankaŭ loĝas Veronika, Vít, Paulina, kaj la ludema hundo Yoko. Ni promenis tra la urbo kaj manĝis ĉeĥan kaj slovakon manĝaĵojn. Ni faris kunlaboran ludon en Escape Room, kie oni devas kune solvi enigmojn por eskapi la ĉambron. Estis bone fari ion alian ol nur kunsidi, sed kompreneble oni ne povas eviti TEJO-temojn eĉ en la drinkejo vespere.